

	<h1>PENSEO</h1>	<p><i>N-ro 263</i> <i>sept. / 2013</i></p>
<p>Monata Beletra Revueto en Esperanto Honorita de Premio Grabowski, 1994</p>		
<p>Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 24-a jaro http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm</p>		

Mikaelo Bronsxtejn (Rusujo)



Al Litovio

Dormas logaj lagoj en sin' arbara,
karesata de fringa kant'.
Jen la spaco paca, la tero kara
por ripozo de la vagant'.

Amikino mia kaj amatino –
mi ripetas al vi sen vant',
havis mi feliĉon en via sino -
Labas vakaras, Lietuva !

Mi flavbeka ĉe la unua veno
kaptis sencon de via ĉarm',
Kaj en koro mia lokiĝis beno -
milda ero de l' tera varm'.

La vagado daŭras dum kruroj fortas,
sed post mia dumviva vag'
la ripozo paca kun vi komfortas –
Labas vakaras, Lietuva !

Dentorad' horloĝa protestas grince –
en la junon ne eblas ven',
sed memoro mia plu montras vin, se
gardas vin mi ĉe mia en'.

Impetigas min la taŭzita spiro,
kaj denove kun juna vant'
vortojn simplajn kantas mi kun admiro:
Labas vakaras, Lietuva!



Anteo (Ĉinujo)



ferio sub velo

inter steloj kaj fiŝaro,
lulate de impulso boateto dormas.
montoj, valo, ebenaĵo, herboj, roĵo...
tra nuboj la masto flugas kun rosgutoj.



virga plaĝo

for de ŝtonaj muroj kaj viandaj kameraoj,
asketo demetas ĉiujn kamuflilojn en kaj sur la
korpo.
marvirino kaj li povas naĝi kaj baniĝi,
sumumiĝi...
en aŭ sur la akvo jen blua jen ruĝa jen blanka.



la vojo estis perdita

iama necesejo nun estas butikoj.
kien mia akvo ŝprucas?
levante la voston kuras mi sur monton.
du inoj en arbaro sin intermelkas ufe.

Cezar (Germanujo)



Ne kuru en rado kiel hamstro

(poemo por Anniespera, sed ne al ŝi mem)

Ne kiel hamstro kuru en rado,
sed kuru sur via propra pado.
Ne do rutine stulte konduku.
aŭ eĉ kiel amashom' nur liliputu.

La viv' tro mallongas por tia agado.
Por kio rutino, por kio haltado?
Riĉigu la mondon per nova ideo,
ne estu papag' nur, sed homo de kreo.

Kaj se vi la vivon je l' vosto jam tenos,
la Nekonata per ĝojo vin benos.
La mondo tro belas por kuri en rado.
Estu giganto, memul' dum farado.



PS: La poemo ekestis, ĉar la ĉina esperantistino Anniespera petis min pri klarigo, kion tio signifas: "kuri en hamstrorado." Mi uzis la esprimon en komento pri ĉapitro 48 de Laocio: Dao De Jing.

Mori (Usono)



Mi larmas en mia koro'

Mi larmas en mia koro
Por homo sen espero

mi larmas en mia koro
por homo sen laboro

mi larmas en mia koro

por senpova infano
al kiu mankas pano

mi larmas en mia koro
por honesta persono
al kiu mankas mono

mi larmas en mia koro
por tiu vagabondo
kiun forpelas la mondo

Mi larmas en mia koro
por senkulpa persono
suferanta en prizono

mi larmas en mia koro
por tiu laborulo
kiu laboras kiel mulo

Mi larmas en mia koro
por tiuj malfelicxuloj
kiujn subpremas ricxuloj

mi larmas en mia koro
por l' mortintoj en militoj
pro regantaj profitoj

mi larmas en mia koro
por malricxa homarano
al kiu mankas sano

Mi larmas en mia koro
por malfelicxaj personoj
kiuj sklavlaboras
senpage en prizonoj

Mi larmas en mia koro
por povraj almozuloj
kiujn malhelpas ruzuloj

Mi larmas en mia koro...



Petro Palivoda (Ukrainio)



Nenie kaj neniam


ĉie
en amo
en flamo
sur vojo
en ĝojo
nenie

ĉiam
hieraŭ
hodiaŭ
kaj morgaŭ
iam
kaj nun
neniam

Antaŭjuĝoj

Katoj de l' tuta mondo
unuiĝis kontraŭ min,
ili krucigas vojon
ĉe mia ĉiu paŝo.
Sed unu, kiu tutan tagon
frotiĝas kontraŭ miajn gambojn,
hodiaŭ lavas sin
sur domosojlo.
Kaj mi trankvilas.

Paŭlo Silas (Brazilo)



Evoluprocezaj Ĉeneroj

Anakondfortaj brakumoj klopodas kurbigi
Egalmezurajn kompreno-distancojn.
Sur benk' lerneja sidiĝas lernanto por dikti
De hejmotask', elefantajn nuancojn.

Surprizatakas kruelaj kaŝitaj rozdornoj.
Malbonoflor' kaj dolor' sin ampleksas.

Simi-simile, socie kverelas la homoj.
Ridetvizaĝa simio homecas.

Sin dorsapogas homarevolu' al naturo.
Kadavrobildo aperis sur aĝospegulo.
Ĉar ŝminko vanis; de kameleono, la ruzo.

Ekzistocel' delikata kvazaŭ vakskandelo.
Natur' elĉerpas normalon el kosma konfuzo.
Homar' konfuzon moralan vidas eĉ en helo.

Siv Burell (Svedujo)



Vojmontriloj

Estus gajninde
pensi ke viveventoj
povas instrui lerninde
ke mi kredu je miaj sentoj
kiuj estas sendaĵoj
de Dio, pri la vivaĵoj!
Tutcerte estas tiel!



Mikrorakonto

Ŝjao Ĉi (Ĉinujo)

Korpofortigo

Dum pluraj jaroj mi ne revenis al mia
hejmloko. Antaux nelonge, mi profitis la
okazon de oficvojaĝo, kiu hazarde preterpasis
mian hejmlokon, por renkontiĝi kun miaj
malnovaj konatoj.

En la vilaĝo la antaŭa elementa lernejo
jam fariĝis kaduka kaj dezerta, kun
fenestroj kovritaj de araneaĵoj kaj kelkaj
plasttukoj sur ĝi flirtantaj en malvarma
vento. Petinte informon, mi eksciis, ke tiu ĉi
lernejo estas jam fermata antaŭ kelkaj jaroj kaj

ĝiaj gelernantoj devigite vizitas lernejojn en la urbeto. La saman sorton trafis multaj tiaspecaj elementaj lernejoj, kvazaŭ malplenaj konkoj, el kiuj ne plu aŭdeblas oreplacaj voĉoj de laŭtlegado.

Ankoraŭ kun sento de stuporo, mi vidis kelkajn infanojn kuri sub la gvido de siaj familiestroj en la proksima sportejo de la lernejo.

Mi iris renkonte al ili kaj demandis al unu el la familiestroj: “Nu, nun la lernejo estas fermita kaj la infanoj devas iri longan vojon por lernado, ĉu ne?”

Li respondis: “Vi pravus. Pri tio ni povas fari nenion. La infanoj devas daŭrigi sian lernadon. Ĝuste pro tio, ni, kiel familiestroj, gvidas ilin kuri por plifortigi la korpon ĉiutage.”

Mi diris: “Bona afero. Jen modele vi faras, ke vi gvidas vian infanon trejniĝi por esti en bona sano.”

Li amare ridetis: “Nian motivon vi neniel divenas. Ni faras tion, por ke niaj infanojn havas fortan korpon por piediri la longan vojon de dek kilometroj al la lernejo en la urbeto.”

Mi nekomprene demandis: “Piediri al lernejo? Ĉu mankas lerneja aŭtobuso?”

Li respondis: “Ne! Tamen ni ne estas sufiĉe riĉa por veturi per aŭtobuso!”

Elĉinigiis



Verdeca (Ĉinujo)



Ben Lai (Ĉinujo)

Mi estas soldato

Feliĉe mi sukcesis aĉeti bileton por litvagono. Envagoniĝinte mi tuj falis en dolĉan sonĝon.

Kiam mi vekigis, la vagonaro haltis ĉe la stacio Liucheng. Akompanate de siaj familianoj, knabino envagoniĝis kaj malpeze sidiĝis sur la liton kontraŭ mi.

Ŝia patro konsilis al ŝi, ke dumvoje ŝi ne facilanime parolu kun aliaj nek senpripense diru al aliaj, kien vi iras, kaj ke ŝia partrino atentos ŝin ĉe la celstacio. Dirante, la patro okule balais la kupeon, kaj poste li proksimigis sian buŝon al ŝia orelo kaj flustris iom da vortoj.

La vagonaro anhele kuris dum la tuta nokto. Malaperis la akompanintoj, kiuj forsendis la knabinon, sed ŝi ankoraŭ ne elvagoniĝis. Mi ekbabilis kun ŝi. “Kien vi iras? Ne mistrafus vian celstacion!”

Post longa silento, ŝi mirplene demandis: “Ĉu vi estas homo, kiu sidis kontraŭ mi antaŭe?”

“Jes,” mi respondis, “kio do? Ĉu mi ne estas tiu homo?. Kiam vi envagoniĝis, mi estis ĉi tie. Ĉu vi ne rekonas min?” Mi surpriziĝis dum kelka tempo.

“Mi ne povas vidi. Mi estas blinda,” diris honteme la knabino.

“Do, kial vi vojaĝas sola? Kiel maloportune por vi!”

“Ne gravas. Mi volas esti sendependa. Mia paĉjo volus akompani min al la celloko, sed mi rifuzis.”

“Vi vere...vere kuraĝa,” mi laŭdis. Ŝi havis delikatajn trajtojn, disflorantan rideton kaj belan voĉon de birdkantado.

“Mi elvagoniĝos ĉe la stacio Wuzhou kaj mia panjo rekontos min!” ŝi ĝoje diris.

“Nu, vi devas vin prepari pli frue por elvagoniĝi. La vagonaro haltos tre mallonge ĉe tiu stacio,” mi rimarkigis ŝin bonintence.

“Ĉu vi povus helpi min elvagoniĝi?” ŝi demandis.

“Ĉu? Ĉu vi timas, ke mi priŝtelos vin? Kion vi farus se mi estus malbonulo?” mi ridete diris al ŝi.

Ŝi kluke ridis: “Mi ne timas, ĉar vi estas soldato kaj bonulo!”

Nekomprene mi demandis, kiel ŝi scias, ke mi estas bonulo.

“Mia patro diris tion al mi, kiam ni troviĝis en la kupeo. Li flustris, ke la pasaĝero kontraŭ mi estas vestita per uniformo de soldato, kiu trankviligas lin, kaj ke nenio okazos. Mi aŭdas vin paroli senhezite kaj decideme, kiel soldato, ĉu ne?”

“Jes, mi estas soldato,” mi ridete diris.

Elĉinigi **Kanglong (Ĉinujo)**

Victor Jara (1932-1973)



Preĝo al terkulturisto

Leviĝu kaj rigardu la montaron
de kie venas la vento, sun' kaj akvo,
vi, kiu regas la fluon de l' riveroj,
vi, kiu semis l' animan aspiradon.

Leviĝu kaj rigardu viajn manojn,
por kreski plu, manpremu vian fraton.
Kune ni marŝos ligitaj per la sango,
nun povas esti la sojlo de l' morgaŭo.

Tenu for de ni la subpremantojn
en la mizero.

Venu via regno de justeco
kaj egalec'.

Blovu kiel vento sur floron
de ravino.

Tondru kiel kuglo
tra tubo de fusil'.

Estu via volo ekde nun
sur nia tero.

Dotu per forto kaj kuraĝ'
nin ĉe batal'

Blovu kiel vento sur floron

de ravino.

Tondru kiel kuglo
tra tubo de fusil'.

Leviĝu kaj rigardu viajn manojn,
por kreski plu, manpremu vian fraton.
Kune ni marŝos ligitaj per la sango
kaj nun kaj en la horo de nia mort'.

Amén.

Tradukis



Svena Dun (Hispanujo)

Bedri Alimehmeti¹



Por "Kaza Rikordi"

Nenian koleron ni havis al la angla,
Des pli al la instruistino Afërdita,
Anĝelulino je la hararkrono kiel Dajti² neĝo,
Kiu pli blankan ol ĝi havis sian spiriton.
Sed, la lecionhoron de la angla
Por “Kaza Rikordi”³ ni forlasis.
Kaprico de la aĝo.
Nenion pli.

La tuta lernejo skuiĝis.

Kvazaŭ tertremo estis fundamente ĝin
svinginta.

Urĝa kunveno.

La Pedagogia Konsilio longe disputas.

“Fremda aperaĵo!

La geknaboj de la tria klaso

Forlasas la lecionon pro filmo!”

Oni nomas ĝin striko! Oh, kia frenezaĵo!

En mia kapo bolas la ĥoraĵo “Va pensiero!”

El la “Nabuko” de Verdi.

Pri kia striko temas!?

Kiel la ondegjoj de monta vento
 La furoro de la kritikoj alvenas en nia klaso.
 Severa la “batalo” kun la magiaj sonoj
 De la uverturo de “Norma” de Belini,
 Okupinta niajn animojn.

Pardonu instruistino!
 Estis tio nur adoleskanta kaprico.
 La kompartia sekretario ululas:
 “Vidu vidu, eĉ albane vi tion ne nomas “La
 Domo Rikordi”,
 Sed itale “Kaza Rikordi”!
 Tio estas la kulmino!”
 Kulminas ja kaj haŭttremas.
 La ario de Kavarados el “Toska” de Puĉini.

“La angla estas la plej disvastigita lingvo
 enmonde”.
 La dolĉeco de la voĉo de instruistino Afĕrdita,
 Mildigus ĉiujn tigrojn de la afrika ĝangalo.
 “En la angla verkis Ŝekspiro, Dikenso,
 Bajrono...”
 Leĝera zefiro, dolĉe la klaspacon regas.
 La ario de “Luĉia di Lamermur”.
 Dankon majstro Doniceti.

Instruistino, ni ege amas vin.
 Ne havis aferon kun vi.
 Ne kun vi, nek kun la angla.
 Eĉ tute vi ne pripensu tio.
 Kial ni ne amu la lingvon de Presli,
 Sinantra, Ĉiker, Braun, Gejner, Odis Red⁴..
 Kies kanzonojn ni kantas ĉiutage.

Kaprico de la aĝo tio estis.
 Nur tiome.
 Nothing⁵.
 Nenion pli.
 Por ni vi estis kaj estas.

Ni kredas ke vi scias.
 La plej bona instruistino.
 We love you and you love us”⁶

Aprilo 1962

1. Mia samgimnazio dum la jaroj 1961-1963
2. Monto apud Tirana
3. Casa Ricordi, itala muzikfilmo
4. Elstaraj usonaj kantistoj el la jaroj 60
5. Angle “nenio”
6. Angle: ni amas vin kaj vi amas nin

Enesperantigis



Bardhyl Selimi (Albanio)

Konstantin Cavafy(1863-1933)



depost la naŭa vespere

Noktomezo kaj duono. Tempo fluis depost,
 kiam je la naŭa mi bruligis mian lampon kaj
 lokiĝis ĉi-tie. Mi sidis sen legi, sen paroli. Kun
 kiu mi parolu sola en tiu domo?

Depost kiam je la naŭa mi revivigis mian
 lampon, bildo de mia korpo juna fantaziigis al
 mi, kaj tiu de varmetaj parfumitaj ĉambroj, kaj
 de intaj voluptoj. Kiom aŭdacaj la voluptoj !
 Kaj mi revidis stratojn, kies aspekto tute
 ŝanĝiĝis, ejojn viglecplenajn, kies ekzisto
 ĉesis, teatrojn kaj kafejojn forpasintajn.

La bildo de mia korpo juna aperis al mi, kaj
 ankaŭ memorigis afliktajn rememorojn :
 familiaj mortoj, disiĝoj, sentoj familianaj, volo
 de l’ mortintoj kiujn tiom oni preteratentis.

Noktomezo kaj duono. Kiom forflugas tempo !
 Noktomezo kaj duono. Kiom foriĝas jaroj !

Esperantigis



R. Platteau (Francujo)

Ĉineske

Jadranka Miric (Serbujo)



Mia kuzo esploranto

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Mia kuz'
tre akurate
venis al ni vespere.
Ni akceptis lin frate,
gaje korbate.

Ja, fraŭlo
li estas vera.
Bonhumora kun plaĉa
konduo, tre surtera.
Foje mistera.

Filipo,
agrabla junul'
sian genton esploras.
Adresis sin al fakul'.
Agema povrul'.

Serĉas li
stomako tente
el ampleksa medio,
la praulojn, atente.
Kun ni, konsente .

Zig-zago.
Tre malfacile.
Dume homoj perdiĝis.
Li serĉas vin mobile
kaj komputile.

Malserena sento

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Fortulin'.
Oni diras nun
malantaŭ mia dorso.
Ŝi kore spitas al sun'
al sia aŭtun'.

Fortulin'
eĥadas vente.
Morna gepatra tombo.
Ekis pluvo ŝtormsente.
Larmojn prevente.

Fortulin'.
Sur mutaj lipoj
rido kiel saluto
malgraŭ fiaj viv- vipoj.
Paliĝas lipoj.

Fortulin'!
Forta manpremo.
Dentoj grincas dolore.
Trista animploremo
kaj korpotrejo.

Fortulin'
kun milda mien'!.
La vivo atendas vin.
Al la gepatra bien'!.
Nu, iru tien!

Vivi de sia laboro

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

laboron!
“lukro” serĉata.
Ve, reprotoondoj.
Krias buŝo malsata.
Konto blokata.

Jen, krizo.
Senlaboreco
kaj senutilaj penoj
naskiĝas ĉagreneco
kaj vanececo.

Proleto.
Mediacio.
Pagi, ŝpari, monpuni.
Atakata racio.
Povra nacio.

Socio
malbalanciĝas
mondskale kaj popolo
malforta unuiĝas.
Ni akordiĝas.

Okupu!
Kune vivtenu!
Laboru kun plezuro!
Ne festenu sed trenu!
Laboron benu!

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Niuniu (Ĉinujo)

Mia konfeso

okaze de ŝia naskiĝtago 2013
—laŭ ĉinesko Kuxiangsi*
Dum jaroj mi kun obstin’
sopiri
emas ŝin.
Mi kisas ŝin en halucin’
brakumas
al la sin’.
Sed mavas
la destin’.

Ŝi je mia korinklin’
ne kredas,
ve, l’ virin’!
Ĉu ŝi estas frida maŝin’?
Amata
per domin’

ŝi jame
regas min.

**Kuxiangsi (Profunda sopiro): ĉina fiksforma poemo el du samaj strofoj kun po 8 versoj de 7,33,8,33,33 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xa,xxa (x = senrima)*

Mandio (Ĉinujo)

En betona arbaro

—laŭ ĉinesko Yexingchuan*
La urbo per cemento
kovritas.
Ĉu defendo
aŭ strangolo
jen dubigas
homojn sub tegmento.

Kun abomena sento
loĝantoj
per lamento
ade plendas
tutan tagon
kontraŭ l’ dom-invento.

**Yexingchuan (Nokta ŝipvojaĝo): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun ses versoj de 7,34,446 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa (x = senrima)*

Maupassant (1850-1893)



La Ulnjo Sovaĝa

1-a ĉapitro

Mi ne revenis plu al Virelogne de antaŭ dek kvin jaroj. Mi reiris tien aŭtune por ĉasi, ĉe mia amiko Sival, kiu fine rekonstruigis sian kastelon, detruita de la Prusoj.

Mi tre ŝategis tiun landon. Estas en la mondo ravegaj landoj, kies ĉarmo por la okuloj estas volupta. Ni amas ilin per fizika

amo. Ni, la logataj de la tero, konservas tenerajn memoraĵojn de iuj akvofontoj, iuj arbaretoj, iuj lagetoj, iuj montetoj, ofte viditaj kaj kiuj kormoligis nin kiel feliĉaj eventoj kortuŝas nin. Kelkfoje eĉ la penso revenas al arbareto, aŭ riverbordeto, aŭ fruktarbejo pudrita de floroj, ekviditaj nur unufoje okaze de gaja tago, kaj restitaj en nia koro, kiel tiuj bildoj de renkontpasitaj virinoj sur strato, iun matenon printempe, vestitaj per hela kaj travidebla tualetto, kiuj lasas en nia animo kaj en nia karno nesatigitan deziron, neforgeseblan, la senton de vizitita feliĉo.

Pri Virelogne, mi ŝatis la tutan kamparon, semitan de arbaretoj kaj trapasita de rojoj, kiuj trakuris sur la grundo, kvazaŭ vejnoj sur la haŭto, kiuj alportus la sangon al la tero. Ene oni kaptis kankrojn, trutojn kaj angilojn... Dia feliĉo ! Kelkloke oni povis sin bani, kaj en la altaj herboj, kiuj kreskis sur la bordoj de tiuj etaj riveretoj, oni ofte ekvidis galinagojn.

Mi antaŭeniris, lerta kvazaŭ kaprino, rigardante antaŭ mi priserĉi miajn du hundojn. Sival, je cent metroj dekstre, traesploris luzernan kampon. Mi ĉirkaŭiris la veprojn, kiuj limigis la arbareton de Saudres [*Sodr'*], kaj ekvidis ruinaĵon de pajlotegmenta domo.

Subite, mi memoris pri ĝi, tian mi vidis ĝin lastfoje, en 1869, pura, ornamita per vitoj, kun kokinoj antaŭ la perdo. Kio estas pli malgaja ol mortinta domo, kun ĝia skeleto staranta, ruiniĝanta, sinistra ?

Mi memoris ankaŭ pri ulino, kiu ĉi-ene donis al mi glason da vino, iun tagon de granda laceco, kaj ankaŭ ke Sival rakontis al mi la historion de la loĝantoj. La patro, maljuna ŝtelĉasisto, estis mortigita de la ĝendarmoj. La filo, kiun mi vidis antaŭe, estis granda seka knabo, kiu estis ankaŭ rigardita kiel feroca detruisto de ĉasbestoj. Oni nomis ilin Sovaĝa.

Ĉu temis pri nomo aŭ kromnomo ?

Mi alvokis mian amikon Sival, kiu tuj alvenis per sia longa paŝo de stilzobirdo.

Mi demandis al li :

- Kio fariĝis la loĝintoj ?

Kaj li rakontis al mi tiun aventuron.

2-a ĉapitro

Kiam okazis la militdeklaro, la filo Sovaĝa, kiu aĝis tridek tri jarojn, soldatiĝis, lasante sian patrinojn sola en la loĝejo. Oni ne tro kompatis ŝin, ĉar oni sciis, ke la maljunulino havis monon.

Ŝi restis do tute sola en tiu izolita domo, tre malproksime de la vilaĝo, ĉe la rando de la arbareto. Cetere, ŝi ne timis, ĉar ŝi estis el la sama raso ol siaj viroj, malfacila maljunulino, granda kaj maldika, kiu ne ofte ridis, kaj kun kiu neniam oni ŝercis. La kamparaninoj ne multe ridas cetere. Tio estas afero de viroj ! La kamparaj virinoj havas malgajan kaj limigitan animon, vivante mornan ekzistadon, sen perspektivoj de plibonigoj. La kamparano lernas iom da brua gajeco en la trinkejoj, sed lia kunvivantino restas serioza, kun mieno konstante severa. La muskoloj de ŝia vizaĝo ne lernis la ridmovojn.

La ulnjo Sovaĝa daŭrigis sian ordinaran ekzistadon en sia pajlotegmenta domo, kiu estis baldaŭ kovrita de neĝo. Ŝi venis al la vilaĝo, unufoje ĉiusemajne, por serĉi panon kaj iom da viando ; poste ŝi revenis en sian domaĉon. Ĉar oni parolis pri la lupoj, ŝi eliris kun la fusilo surdorse metita, la rustkovrita fusilo de ŝia filo, kies kolbo estis eluzita pro la frotoj de la mano. La vidado de la granda Sovaĝa estis kurioza, ŝi marŝadis iom kurbiĝanta, antaŭenirante per malrapidaj paŝolongoj sur la neĝo, la fusiltubo superante la nigran kufon, kiu premis al si la kapon, kaj apartigis siajn blankajn harojn, kiujn iu neniam vidis.

Iam la Prusoj alvenis. Oni apartigis ilin inter la loĝantoj, laŭ la riĉaĵoj kaj la monrimedoj de ĉiu. La maljunulino, kiun oni sciis riĉa, estis taksita je kvar soldatoj.

Estis kvar dikaj knaboj, kun pala karno, blonda barbo, bluaj okuloj, restitaj grasaj

malgraŭ la laciĝoj jam suferitaj, kaj bonkarakteraj kvankam en konkerita lando. Solaj en la domo de tiu maljunulino ili montriĝis tre komplezemaj kun ŝi, evitigante al ŝi kiel eble plej laciĝojn kaj elspezojn. Oni vidis ilin ĉiujn kvar sin lavi matene ĉirkaŭ la puto, kun la manikoj kuspitaj, malsekigante plenakve en la kruda lumo de la neĝo, sian blankan kaj rozan karnon de nordaj viroj, dum ulnjo Sovaĝa iris kaj reiris, preparante la supon. Poste oni vidis ilin purigi la kuirejon, froti la pavimon, fendi lignon, senŝeligi terpomojn, lavi la tolaĵojn, plenumi ĉiujn mastrumajn taskojn, kiel kvar bonaj filoj ĉirkaŭ sia patrino.

Sed la maljunulino pensis senĉese pri la sia, pri sia maldika grandulo, kun hoka nazo, brunaj okuloj, densaj lipharoj, kiuj faris sur lia lipo hupon de nigraj haroj. Ĉiutage ŝi demandis al ĉiu soldato loĝanta en sia hejmo : " Ĉu vi scias kie estas la franca regimento, dudek-tria de marŝo ? Mia knabo estas ene. "

Ili respondis : " Ne, ne scii, tute ne scii. " Kaj komprenante ŝian doloron kaj ŝiajn zorgojn, ĉar ili havis patrinojn tie for, ili faris al ŝi mil servetojn. Cetere, ŝi bone amis siajn kvar malamikojn ; ĉar la kamparanoj ne multe konas la patriotajn malamojn, tio apartenas nur al la superaj klasoj. La humiluloj, tiuj kiuj pleje pagas ĉar ili estas malriĉaj kaj tial, ke ĉiu nova elspezo superŝutas ilin, tiujn kiujn oni amase mortigas, kiuj formas la veran kanonbuĉaĵon, ĉar ili estas la nombro, fine tiuj kiuj plej kruele suferas de la aĉegaj mizeroj de la milito, ĉar ili estas la plej malfortaj, la malplej fortikaj, ne multe komprenas tiujn militemajn ardojn, tiun eksciteblan honorsenton kaj tiujn kvazaŭajn politikajn kombinaĵojn, kiuj elĉerpas en ses monatoj du naciojn, la venkintan kiel la venkitan.

En la lando, parolante pri la Germanoj de la ulnjo Sovaĝa, oni diris : " Jen kvar gastigataj kun manĝo kaj domo. "

Nu, iun matenon, dum la maljunulino estis sola hejme, ŝi ekvidis malproksime sur la ebenaĵo viron, kiu venis al ŝia loĝejo. Baldaŭ ŝi rekonis lin, estis la leterportisto. Li transdonis al ŝi kvaroble falditan paperon. Ŝi eltiris el sia poŝo sian okulvitrujon, surmetis siajn okulvitrojn, kiujn ŝi uzis por kudri kaj legis : " Sinjorino Sovaĝa,

Per tiu ĉi letero mi anoncas al vi malgajan novaĵon. Hieraŭ, via knabo Viktoro estis mortigita de kanonkuglo, kiu laŭvorte tranĉis lin en du partoj. Mi troviĝis tute proksime de li konsiderante, ke en la roto ni estis flankon ĉe flanko, kaj li parolis al mi pri vi, por ke mi tuj avertu vin se okazos malfeliĉo al li.

Mi prenis en lia poŝo lian poŝhorloĝon, por ke mi realportu ĝin al vi, kiam la milito estos finiĝinta.

Mi salutas vin amike.

Cezaro Rivo,

Simpla soldato en la 23-a de marŝo. "

La letero datiĝis de tri semajnoj.

Ŝi ne ploris. Ŝi restis senmova, tiom emociita, tiom hebeta, ke ŝi eĉ ne suferis ankoraŭ. Ŝi pripensis : " Nun, jen Viktoro mortinta. " Poste, iom post iom, la larmoj alvenis en ŝiajn okulojn, kaj la doloro invadis ŝian koron. La ideoj, teruraj kaj turmentataj, alvenis al ŝi, unu post la alia. Ŝi ne plu kisos lin, sian infanon, sian grandulon, neniam plu ! La ĝendarmoj mortigis la patron, la prusoj mortigis la filon... Li estis tranĉita en du partoj per kanonkuglo. Kaj ŝajnis al ŝi, ke ŝi vidis la scenon, la teruran scenon : la kapo, kiu falis, la okuloj malfermitaj, dum li maĉis pinton de siaj dikaj lipharoj, kiel li faris kiam li koleris.

Kaj poste, kion oni faris kun lia korpo ? Se almenaŭ oni redonis ŝian infanon al ŝi, kiel oni redonis ŝian edzon, kun kuglo meze de la frunto !

Sed ŝi aŭdis voĉbrulon. Estis la Prusoj, kiuj revenis de la vilaĝo. Ŝi rapidege kaŝis la

leteron en sian poŝon, kaj trankvile akceptis ilin, kun sia ordinara vizaĝo, ĉar ŝi jam havis tempon por bone sekigi siajn okulojn.

Ĉiuj kvar ridis, kontentaj ĉar ili alportis belan kuniklon, sendube ŝtelitan, kaj ili faris signojn al la maljunulino, ke oni tuj manĝos bonan aĵon.

Senprokraste ŝi eklaboris al la pretigo de la tagmanĝo ; sed, kiam estis necese mortigi la kuniklon, ŝi ne kuraĝis. Kaj tamen ĝi ne estis la unua ! Unu el la soldatoj mortigis ĝin per pugnobato malantaŭ la oreloj. Kiam la besto estis mortinta, ŝi eligis la ruĝan korpon el la felo ; sed la vido de la sango, kiun ŝi tuŝis, kiu kovris al ŝi la manojn, varmeta sango kiun ŝi sentis malvarmiĝi kaj koaguliĝi, tremigis ŝin de kapo ĝis piedoj ; ŝi ĉiam vidis sian grandulon tranĉitan en du partoj, kaj tute ruĝa ankaŭ, kiel tiu animalo ankoraŭ tremetanta.

Ŝi altabliĝis kun siaj Prusoj, sed ne povis manĝi, eĉ unu glutaĵon. Ili formanĝis la kuniklaĵon ne zorgante pri ŝi. Ŝi oblikve rigardis ilin, ne parolante, maturiĝante ideon, kun vizaĝo tiom senesprima, ke ili rimarkis nenion.

Subite, ŝi diris : " Mi eĉ ne scias viajn nomojn, kaj tamen ĵen jam unu monato, ke ni vivas kune. " Ili komprenis, ne facile, tion kion ŝi volis, kaj diris siajn nomojn. Tio ne sufiĉis al ŝi ; ŝi skribigis ankaŭ sur papero iliajn nomojn kun la adresoj de iliaj familioj, kaj surmetante denove siajn okulvitrojn sur sian grandan nazon, ŝi ekzamenis tiun nekonatan skribmanieron, poste ŝi faldis la folion kaj englitis ĝin en sian poŝon, super la letero, kiu anoncis la morton de ŝia filo.

Kiam la manĝaĵo estis finiĝinta, ŝi diris al la viroj :

- Mi tuj laboros por vi.

Kaj ŝi eksupreniris fojnon en la subtegmenton kie ili dormis.

Ili miris pro tiu laboro ; tiam ŝi eksplikis al ili, ke tiamaniere ili malpli suferos malvarmon ; kaj ili helpis ŝin. Ili stakigis

faskojn ĝis al la tegmento el pajlo ; kaj ili konstruis al si specon de granda ĉambro, varma kaj parfumita, kun kvar muroj el furaĝo, inter kiuj ili mirinde dormos.

Dum la vespermanĝo, unu el ili zorgis pri tio, ke ulnjo Sovaĝa ankoraŭ ne manĝis. Ŝi asertis, ke ŝi suferis kramfojn. Poste ŝi ekbruligis bonan fajron por sin varmigi, kaj la kvar Germanoj supreniris en sian loĝejon per la ŝtupetaro, kiun ili uzis ĉiuvespere.

Tuj kiam la klappordo estis refermita, la maljunulo demetis la ŝtupetaron, poste senbrue ŝi remalfermis la eksteran pordon, kaj denove iris serĉi pajlofaskojn, kun kiuj ŝi plenigis sian kuirejon. Ŝi nudpiede marŝis en la neĝo, tiom delikate, ke oni aŭdis nenion; De tempo al tempo, ŝi aŭskultis la sonorajn kaj neregulajn ronkadojn de la kvar dormantaj soldatoj.

Kiam ŝi juĝis siajn preparojn esti sufiĉaj, ŝi ĵetis en la fajron unu el la faskoj, kaj kiam ĝi flamis, ŝi disŝutis ĝin sur la aliajn, poste ŝi reeliris kaj rigardis.

En kelkaj sekundoj violenta heleco iluminis la tutan internan de la pajlotegmenta domo, poste estis terura ardejo, giganta arda forno, kies lumo elŝprucis tra la mallarĝa fenestro ĵetante sur la neĝo lumegan ruĝan radion.

Ega krio eligis de la supro de la domo, poste estis klamado de homaj hurladoj, korŝiraj alvokoj angordonaj kaj teruraj. Poste, la klappordo disfalinte internen, fajrokirlo sturmis en la subtegmenton, krevis la tegmenton el pajlo, supreniris al la ĉielo kiel giganta torĉoflamo ; kaj la tuta domo flamis.

Oni aŭdis ene nur la kraketadon de la incendio, la krakadon de la muroj, la disfalegon de la traboj. Subite la tegmento disrompiĝis, kaj la arda trabaro de la loĝejo ĵetis en la aeron, meze de fumnebulo, grandan plumbufon de fajreroj.

La blanka kamparo, lumigita de la fajro flagretis kiel arĝenta tavolo ruĝe kolorita.

